
ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2000/2

**aŭtuno/vintro 2000**

*Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 1556499 for the Lumo*



# LUMO

*Lumo*n eldonas dufoje jare KEA, P.O. Box 2159, Sidney, BC, Kanado V8L 3S6 <www.esperanto.ca/kea/>
*Lumo* ('light') is published biannually by the Canadian Esperanto Association
*Lumo* ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

## ENHAVO DE LA NUMERO


Novaĵoj de KEA ........................................... 3
Venontaj aranĝoj en Kanado/Ameriko
  Pri la 5a TAKE (Meksik-Urbo) ......................... 4
  Ŝi vagis ankaŭ Kanaden ............................... 6
  Raportoj pri NOREK ................................... 7
  Raporto pri Okemo .................................... 8
Internaciaj novaĵoj
  Pri Manifesto 2000 ................................... 10
  Akademio en la reto .................................. 12
  Aŭstria katalogo en la reto .......................... 12
  *El Popola Ĉinio* minacata ........................... 12
  Dankado al Zamenhof .................................. 13
Artikolo
  Kandidataj spertoj (oktobro 2000) .................... 14
Nekrologoj
  Paul Vaughan (de Ken Price) .......................... 16
  Ruediger Eichholz (de Ken Price) ..................... 16
Diversaĵoj ............................................. 18


## LA KOLUMNO DE LA REDAKTORO

Vi atendas *Lumo*n dum monatoj (eĉ jaroj!), kaj subite, post preskaŭ neniu vivo-signo, aperas du numeroj en nur du monatoj! Kiel vi (mi esperas), mi ĵus ricevis la suplementan numeron de nia revuo, redaktitan de Paul Hopkins: gratulojn al li pro la interesa numero. Dum la venontaj malvarmaj monatoj vi do povos gustumi preskaŭ 50 paĝojn de brila (aŭ almenaŭ luma) materialo.

Nia lasta numero eble malobeis naciajn regulojn pri "kanada enhavo", sed mi ne havas timojn pri la nuna - dank' al Ken Price, Arono Chapman kaj Matt McLauchlin. Mi estas tre dankema pro tiu enfluo da kontribuaĵoj, kaj esperas ke ĝi stimulos aliajn agi simile. Evidentiĝas el la artikoloj kaj raportoj ke mankas nek agemuloj nek eventoj (priraportendaj) nek bonaj verkistoj. Bonvolu noti ke artikoloj pri ne-Esperantaj temoj estas ĉiam tiom bonvenaj kiom raportoj pri movadaj aferoj. Ideale ni havos minimume unu tian artikolon en ĉiu numero: do kial vi ne verku ion pri viaj spertoj ekster la movado?

Mi fieras prezenti *Superzam* al vi en ĉi tiu numero. Jam mi represis ĉi tiun bildstrion en *Saluton!*, la revuo de Junularo Esperantista Brita, kiam mi ĝin redaktis. Ĉar mi supozas ke neniu leganto de *Lumo* vidis aŭ *Saluton!* aŭ *Kial ne?* (en kiu la bildstrio unuafoje eldoniĝis), mi kredis ke estus oportune ĝin represi denove. Mi notu fine ke mi ankaŭ bonvenigas bildajn kontribuaĵojn.

Multan dankon al Steĉjo Norvell pro helpo pri la ĉi-numera kompostlaboro.


Geoffrey Greatrex, 1007-5415 Victoria Road, Halifax, NS B3H 4K5, KANADO.

<Geoffrey.Greatrex@dal.ca>, faks. (902)-494-2467.


**Limdato por kontribuaĵoj al la venonta numero: 1a de junio 2001.**



## Novaĵoj de KEA

**Prezidanta eksiĝo**

Dum la pasintaj du jaroj premoj de la profesia kaj persona vivo donis al nia prezidanto de KEA, Ciprian Jauca, malmultan tempon dediĉi sin al postuloj de liaj postenoj en la Esperanto-movado. Fine, je la 22a de novembro Ciprian prezentis al la estraro de KEA sian demision kiel (1) estrarano de KEA, (2) prezidanto de KEA kaj (3) reprezentanto de la kanada esperantistaro en la Komitato de UEA, demision tuj efika.


Ni deziras al samideano Jauca ĉion bonan, esperante ke li revenos inter la agantoj de nia asocio kiam liaj ekstermovadaj devoj tion permesos. La prezidantan rolon nun transprenos la ĝis-nuna vicprezidanto, Brian Kaneen (bodokan@telus.net), kiu ankaŭ denun respondos je mesaĝoj adresitaj al la asocia ret-adreso (esperanto@canada.com).

Laŭ la statuto de ni asocio, la estraro povas elekti novan estraranon por anstataŭigi demisiintan reprezentanton de la ĝenerala membraro. Se iu inter la membroj de KEA pretas servi estrare (kaj ne jam estas estrarano), tiu bonvolu kontakti Brian Kaneen. KEA nun ankaŭ serĉas iun, kiu pretos servi kiel kanada reprezentanto en la Komitato de UEA. Ĉar la venonta tri-jara deĵorperiodo komenciĝos en 2001, la ideala kandidato estos estrarano de KEA kiu pretos servi dum tri jaroj en la Komitato kaj kiu (antaŭvideble) povos proprakoste partopreni almenaŭ du el la venontaj Universalaj Kongresoj. Minimume tamen la elektoto estos individua membreco kaj en KEA kaj en UEA kaj partoprenos en la venonta UK (en Zagreb). Por pliaj informoj, skribu al Paul Hopkins:


<phopkins@cymfony.com>.

**Diversaĵoj**

(1) Paul Hopkins sukcesis rekomenci eldonadon de la ret-bultenoj de KEA. Kelkaj aperis lastatempe.



(2) La retejo de Kanada Esperanto-Asocio havas novan prizorganton. Li estas Clayton Smith (Esperante: Argilo), studento de matematiko ĉe la Universitato de Waterloo nun laboranta en Toronto. Clayton jam multrilate ĝisdatigis nian retejon, kies Esperanta versio estas ĉe la adreso: http://esperanto.ca/kea/. Ni invitas vin viziti la paĝon. Diru al Argilo, kies propran retejon vi povas viziti per la ligo piede de la kanada indekso-paĝo (Esperanta versio: http://esperanto.ca/), kio plaĉas al vi koncerne la retejon kaj eventuale kio estas pliboniginda. Dank' al Argilo, ankaŭ la retejo de la Esperanto-Klubo de Victoria (Esperanta versio: http://esperanto.ca/victoria/) ĝisdatiĝis. Nun tie aperas ĝustaj informoj pri kiel trovi niajn kunvenojn (kaj ankaŭ la daton kaj lokon de NOREK 2001!).



(3) Nia franc-lingva bulteno *Aujourd'hui l'espéranto* estas nun rete legebla ĉe http://www.digicom.qc.ca/~hgarcia/AhE/AhE0.html kaj paperaj ekzempleroj de la septembra numero dissendiĝis al ĉiuj, kiuj nur ĝin ricevas.

(4) Oni ne intencas prepari membro-liston por 2000 parte pro la manko de membro-renoviĝoj; sed Paul Hopkins intencas prepari liston por 2001 en februaro.

## NOVAĴOJ PRI LA MOVADO EN KANADO

### VENONTAJ ARANĜOJ KANADAJ/AMERIKAJ

15-21 apr. 2001: 5a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Meksikurbo (Meksiko)

KONGRESA TEMO: AMERIKO - UNU KONTINENTO, DIVERSAJ HISTORIOJ

Poŝta adreso: MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO, Apartado Postal M-10576, Mexico, DF, MX-06000, MEKSIKO. TTT-paĝo: en preparo, atendu novan adreson aŭ petu informon ĉe: mike@math.cinvestav.mx aŭ gelar@hotmail.com

Kial estos speciala la 5a TAKE?

★ Fama Meksika festa spirito!
★ Tagmanĝo apud azteka lagbordo!
★ Bankedo sur 15a etaĝo kun belega nokta panoramo!
★ Imponaj Piramidoj supre sur kiuj ni kantos La *Esperon*!
★ La plej dika arbo en la mondo!
★ La plej granda antropologia kolekto de la mondo!
★ Prezentado de 4 novaj libroj!
★ Eminentuloj de pluraj landoj:

Johano Bachrich, Mark Fettes, J. Luis Gutierrez, Michela Lipari, Bill Maxey, Hugo Mora, Atilio Orellana, James Resende Piton, KAJ ALIAJ!

Plus Muziko, Teatraĵoj kaj... diversaj aliaj surprizoj!!!

TUTAMERIKAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

La Tutamerikaj Kongresoj estas internacia manifestacio de la esperantistoj, organizitaj de la koncerna amerika lando, kiu akceptas prizorgi la aferon. Ĝi celas plifortigi solidarecon inter la tutamerikaj esperantistoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn. La Kongreso intencas enhavi multnombrajn programerojn por ke en ĝi kunvenu diversajn fakajn aŭ ne fakajn samideanojn, kiuj interesiĝas konigi diversajn proprajn, grupajn kaj oficialajn agadojn de la Esperanto-movado en la diversaj landoj de la Amerika Kontinento kaj de aliaj partoj de la mondo, kiuj iamaniere rilatiĝas kun ni. Krom la laboraj partoj, la Kongreso enhavas ankaŭ multajn klerigajn kaj distrajn programerojn, kies celo estas eduki la partoprenantojn kaj konigi al ili la Kongresan landon. Ĝia oficiala lingvo estas Esperanto.

Unu el la celoj de la Kongreso estas ankaŭ prezenti la Esperanto-movadon, en ĝia tuta amplekso, al la ekstera publiko kiu interesiĝas pri ĝi kaj al la novaj geesperantistoj, kiuj antaŭeniros kun nia movado estonte.



PROVIZORA PROGRAMO

Dimanĉo 15a (de aprilo): Registro / Interkona Vespero
Lundo 16a: Registro / Malfermo / Oficiala fotografio / Malfermo de Ekspozicioj / Prelegoj / Meksika Nokto
Mardo 17a: Prelegoj / Ekskurso al Soĉimilko / Arta vespero
Merkredo 18a: Diservo / Prelegoj / Teatraĵo
Ĵaŭdo 19a: Tuttaga ekskurso al Teotihĵakanaj piramidoj
Vendredo 20a: Ekskurso en Meksikurbo / Prelegoj / Kultura agado
Sabato 21a: Prelegoj / Kunsidoj / Fermo / Bankedo
Dimanĉo 22a: Vizito al la Nacia Antropologia Muzeo kaj Ekskurso al la Vilaĝo Kojoakan
23a-27a: Postkongresa Ekskurso

### ANTAŬKONGRESAJ AGADOJ

**RETA DISKUTEJO**

Pri temoj diskutindaj kaj pritraktotaj dum la 5a TAKE. Se vi deziras partopreni, bonvolu iri al http://www.egroups.com kaj klaku sinsekve sur "my groups", "taketemoj" kaj "messages" por legi ilin.

BELARTA KONKURSO POR JUNULOJ KAJ INFANOJ: ALVOKO

Belarta Konkurso *Kiel mi vidas mian landon*. La Meksika Esperanto Federacio invitas ĉiujn infanojn kaj gejunulojn (Esperantistojn kaj gefilojn de Esperantistoj), partopreni konkurson pri desegnado kaj pentrado; okaze de la 5a Tutamerika Kongreso De Esperanto, realigota en Meksikurbo de la 15a ĝis la 21a de aprilo 2001. La interesitoj povas partopreni per desegnaĵo aŭ pentraĵo laŭ iu ajn tekniko, ne tridimensia, en mezuro maksimume 40 × 55 cm, en unu el la tri sekvaj kategorioj: (a) 4 ĝis 9 jaraĝoj, (b) 10 ĝis 14 jaraĝoj, (c) 15 ĝis 18 jaraĝoj. La konkursa temo estas *Kiel mi vidas mian landon.* Dorse de la verko devas esti klare notitaj la sekvaj informoj: plena nomo de la aŭtoro, adreso, naskiĝdato, titolo kaj tekniko. La konkursaĵojn oni sendu volvitaj, ne falditaj, al la adreso de la Meksika Esperanto Federacio. La konkursaĵoj estos akceptataj ĝis la 15a de marto 2001. Estos aljuĝitaj po unu premio al ĉiu el la tri kategorioj a, b kaj c. La premio estos meksika artaĵo. Cetere, estos aljuĝitaj la premioj 'Honora mencio' al po unu verko en ĉiu kategorio. Ĉiu konkursaĵo ricevita fariĝos parto de la arta kolekto de MEF. Ni esperas kalkuli je via entuziasma partopreno!

DUMKONGRESAJ AGADOJ:

Ĉeĥ-Kurso: instruota de Atilio Orellana.
Internacia ekzameno: estrata de Bill Maxey.

Librovendejo: Prezento kaj vendado de libroj, inter aliaj, la ĵus tradukitaj literaturaj meksikaj verkoj. Se vi intencas ekspozicii aŭ vendi iun materialon vian aŭ de via lando, tio ankaŭ eblas fari ĉi tie dum la Kongreso.

## ŜI VAGIS ANKAŬ KANADEN

Denove ĉi-jare, mi spertis la grandan plezuron partopreni en la Internacia Semajnfino Esperantista ĉe la skiejo Okemo en Vermonto, Usono. Ĉiujare la ISE celas kunigi Esperantistojn el nordorienta Ameriko dum tritaga semajnfino. Tiu de 2000 (jam la sepa) estis granda sukceso danke al la laŭdinda laboro de la Esperanto-Societo Kebekia kaj kelkaj kluboj kaj asocioj usonaj.

Ĉiufoje oni havas la ŝancon renkonti amikojn novajn kaj malnovajn. La ĉi-jaran renkontiĝon partoprenis pluraj novuloj. Kelkaj el ili eĉ venis de sufiĉe malproksime. Unu elstara kongresano estis Amanda Higley. Jam konata en pluraj disaj partoj de Esperantio, Amanda venis al Okemo de Kalifornio por unuafoje sperti la belan aŭtunan renkontiĝon kaj por komenci diskonigi siajn unikajn esperantistajn travivaĵojn al nordamerikanoj.

Amanda lastatempe vivis dum dekses monatoj en dekses landoj de Eŭropo. Utiligante Pasportan Servon, ŝi loĝis kun pli ol cento da Esperantistoj. Si kontentegas pri siaj spertoj. Ŝi profitis la okazon malmultekoste malkovri Eŭropon kaj ties diversajn kulturojn, pruvante ke Esperanto ja bonege funkcias kiel interkona lingvo. Certe neniu nura turisto povus ĝisradike gustumi la popolojn kaj iliajn kutimojn.

Tiom Amanda ĝuis la ĉirkaŭ vojaĝadon, ke ŝi konstatis la neceson dividi siajn spertojn kaj instigi al aliaj Esperantistoj, precipe junaj, vojaĝi simile. Do, Amanda regalis nin per trezoro de rakontoj. Per sia amikeca kaj facila sinteno ŝi multe inspiris nin. Cetere, ŝi trovis eĉ pli da amikoj.

Post la renkontiĝo, Amanda veturis kun kanadaj junuloj al Montrealo, kie ŝi prelegis al junaj neesperantistoj pri la pruvita valoro de Esperanto, kaj kiel ŝi bele uzis ĝin por travojaĝi Eŭropon. Malmultekosta vojaĝado estas bona varbilo, speciale por studentoj. Kelkaj aŭskultintoj bone konstatis la lernindon de Esperanto, kaj Amanda provizis al ili komencajn lernilojn kaj kontaktojn.

Poste, Amanda daŭrigis sian kanadan prelegvojaĝon en Otavo. El la tie organizitaj prelegoj ŝi ĉerpis eĉ pli da sukceso. Ŝi renkontis plurajn pliajn junulojn kaj reklamis por Esperanto el sia unika kaj valora vidpunkto.

Multaj homoj lernis el la spertoj de Amanda kaj ĝuis ŝian varman personecon dum ŝi vizitis la du kanadajn urbojn. Ankaŭ Amanda ĝojis renkonti kanadanojn kaj lerni pli pri nia lando. Estis bonege ekkoni Amandan kaj ŝiajn travivaĵojn. Estis ankaŭ speciale utile kaj refreŝige vidi la gravecon de bona sinteno. Amanda instruis al ni kion oni ja diru kiam oni trafas problemojn: "Ne gravas!"

Arono Chapman – Otavo, Kanado



## PRI LA 19A NOREK (29a de septembro - 1a de oktobro 2000)

### KONCIZA RAPORTO

La Nordokcidenta Regiona Esperanto-konferenco okazis en Saanichton, Kanado, en la provinco de Brita Kolumbio inter la 19-a de septembro gis la 1-a de oktobro, 2000. Kvardek geesperantistoj ĉeestis.

NOREK estas la akronimo por konferenco kiu jam fariĝis tradicia por la Esperantistoj kiuj loĝas en geografia regiono loke konata kiel Kaskadio. Kaskadio ampleksas la okcidentajn partojn de Kanado kaj Usono laŭlonge de la Pacifika marbordo kies arbaroj estas ĉefe borealaj kaj kies riveroj fluas en la Pacifikan Oceanon.

Ĉiujare iuj Esperantistoj el la tuta mondo decidas fari ion novan kaj aventuran kaj vizitas ĉi tiun vere unikan konferencon. La temon de la konferenco, *Esperanto, lingvo de la paco*, traktis la prelego de Joe Gamble, ***Kiel kreskigi gefratraran mondkulturon***. Sekvis diskuto kiu traktis aspektojn de kulturoj kiuj apartigas homojn kaj diferencigas ilin. La rolo de Esperanto kiel sema kulturo, kulturo de paco kiu semigas naciajn kulturojn per nacilingvaj tradukoj el la Esperanta kulturo estis konsiderata kiel bona direkto por plia evoluigo; kaj oni aludis la kontribuon pacan de Esperanta literaturo.

Aliaj programeroj distris, informis, kaj amuzigis la konferencanojn. Inter ili estis: Nova leciono de ***Pasporto al la tuta Mondo*** vidbendkurso; du ekologiaj vidbendfilmoj en Esperanta traduko, ***La Mondo De La Fantoma Urso*** kaj ***Marmoto***; diapozitiva programo pri la libro ***Stelaluna***, infana libro pri spertoj de vesperto inter birdoj, kies vivhistorio montris la valoron de amikeco malgraŭ ekzisto de malsameco; diapozitiva programo pri teceremonioj en Japanio; amuza skeĉo; informo pri la U.K. en Telavivo; komuna kantado al gitara muziko; bankedo; kaj ekskursoj.

Wally du Temple

### LA VIDPUNKTO DE UNU PARTOPRENANTO

Mi alvenis ĉe la hotelo "Waddling Dog" [Anasmarŝanta Hundo] proksime de Viktoria, Brita Kolombio, malfrue ĵaŭdan vesperon la 28an de septembro. En la mateno mi rigardis tra la fenestro, kaj vidis Wally duTemple, organizanton de la renkontiĝo. Li estis fiksanta flagstangon al granda metala 'skatolo' en la aŭtoparkejo antaŭ la hotelo.

Mi rapidis malsupren por saluti lin. Evidentiĝis ke la 'skatolego' havas radojn ĉe unu ekstremaĵo. Wally diris, ke ĝi estas trenebla ekspoziciejo/vendejo. Mi supozis ke aliaj ĉeestontoj ne alvenos antaŭ la fino de la posttagmezo, sed kiam mi iris en la restoracion por lunĉi, du kunmetitaj tabloj jam okupiĝis de esperantistoj el Vaŝingtonio kaj Kalifornio. Post mi, venis pliaj, kaj ni aldonis trian tablon. Lunĉo, kaj postmanĝa babilad(ad)o, daŭris ĝis post la tria. Mi ĝojis renkonti denove multajn pasintjarajn ĉeestintojn, kaj ankaŭ amikon, kiun mi ne vidis depost januaro 1970 - Frank Helmuth. Frank kaj Gloria venis el San Diego, en suda Kalifornio.

Dudeko el ni iris al restoracio apud la Papilia Ĝardeno. Ĝi havas bonan menuon. Mi manĝis kraban kaj salikokan pladon, kaj tre ĝuis ĝin kaj la konversacion. Post la manĝo, kelkaj personoj, kiuj devis veturi longe por iri hejmen (krom mi) adiaŭis, reiris al la hotelo, aŭ ekveturis hejmen. Dekduo da ni aliaj iris kun Wally al la famaj Ĝardenoj Butchart, ĝuante la sunbrilan veteron. Ĉar necesus piediri dum pli ol eble horo kaj duono, unu el la grupo kiu havis problemon marŝi rezignis pri partopreno. Sed Wally sciis, ke oni povas pruntepreni rulseĝon tie, do li iris kaj pruntepreni ĝin. Ŝi sidiĝis en ĝi, kaj Wally

komplezeme puŝis ĝin, supren kaj malsupren laŭ deklivoj, tra la tute ĝardenaro, tiel ke ne mankis al ŝi la okazo ĝui la kunan viziton al tiu bela loko.

Kiam ni vidis ĉion, Wally veturigis min kaj Joel al "La Anas-marŝanta Hundo", kaj diris ke li havas kelkajn taskojn por fari, sed revenos poste. Mi lasis miajn aĉetaĵojn en mia ĉambro, kaj post refreŝiĝo, iris malsupren por iom promeni. Ne necesis por mi flugi hejmen ĝis la sekva mateno. Promeninte dum duona horo, mi revenis al la hotelo, kaj renkontis Joel Brozowski en la enirejo. Li ne intencis reiri al Kalifornio ĝis la morgaŭa mateno, kaj atendis la revenon de Wally. Ni iris eksteren kaj iom promenetis, babilante, tiam sidiĝis apud la enirejo, ĝis Wally kaj Olga alvenis.

Wally proponis montri al ni la lokon kie li deziras okazigi NOREK en 2001, en Sidney, kaj tiam iri al restoracio, por manĝi. Bona ideo! Sidney estas multe pli bona loko por promeni ĉe butikoj, artgalerioj ktp. Oni povos promeni al la marbordo - tre plaĉa! Ni iris al restoracio ĉe la marbordo, kaj denove ĝuis bonajn manĝaĵojn kaj konversacion. Wally proponis, ke anstataŭ mendi deserton, ni reiru al ilia domo, por manĝi "la faman torton de Olga". Joel kaj mi tuj konsentis, kaj plej grave, Olga ankaŭ konsentis! La torto estis rubusa torto, kaj ja meritas esti "fama"! Denove ni ĝuis multe da konversacio, pri diversaj temoj, ĝis preskaŭ la deka vespere, kiam Wally reveturigis nin al la hotelo.

Ken Price

## La 7a Internacia Semajnfino Esperantista, en Okemo

En la pasintaj jaroj Paul Ronald kelkfoje rekomendis ĉeesti tiun kunvenon, kiu okazas ĉiu-jare dum nia dankfesta semajnfino (Kolumbo-tago en Usono). Ĉi jare mi ĉesis labori, kaj havas tempon ferii, sen pensi "Ĉu mi devos labori en tiu semajnfino?", do mi decidis iri.

En majo mi partoprenis la ELNA-kongreson en Atlanto, Georgio, kun postkongresa vizito al Savano. Mi menciis Okemon, kaj iuj diris "vi devus iri, vi ĝuos ĝin". Do mi decidis iri, kaj kiam mi estis ĉe-hejme denove, mi trovis la retpaĝon pri Okemo, kaj aliĝis. Mi ne povis trovi Okemon sur la mapo de Vermonto. Kiam mi ricevis konfirmilon kaj informojn perpoŝte, mi vidis ke temas pri "Okemo Monta Feriejo, Ludlow, Vermonto". Tion mi trovis. Necesos veturi dum dekunu horoj aŭtomobile por atingi ĝin. Ĉar la renkontiĝo komenciĝas sabatan posttagmezon, mi veturis de Toronto 250-mejlojn orienten al Cornwall, vendrede, por esti sufiĉe proksima por atingi Okemon facile sabaton.

Transirinte la landlimon ĉe la Akwesasne rezervejo, mi iris orienten tra angulo de Novjorkio sur malpli rapida, sed pli interesa vojo, kiu serpentumas tra urbetoj. Atinginte la nordokcidentan angulon de Vermonto, mi iris suden rapide sur interŝtata ŝoseo I89. Ĝi iras tra montoj, sur kiuj aceroj jam montras ruĝajn foliojn - bela veturo! Por la lasta parto de la vojaĝo mi laŭiris lokajn vojojn, kiuj iras tra multaj urboj kaj vilaĝoj. Ŝajnis, ke ĉie okazas festivaloj. Multaj aŭtomobiloj plenigis la vojon, kaj progreso estis ege malrapida dum kelkaj mejloj.

Mi atingis Okemon je la fino de la posttagmezo, trovis mian apartamenton (tre belan), kaj iris al la kunvenejo. Jam alvenis pli ol kvardek Esperantistoj. Normando Fleury, kiun mi unuafoje renkontas, prezentis min al Thomas Eccardt kaj Neil Blonstein, el Novjorko. Post vespermanĝo ni babilis ĝis la horo por la vespera programo, nomita Amikeca Vespero. Seĝojn oni movis por krei grandan circlon. Unue, ĉiu prezentis sin al la aliaj. Normando



rakontis pri la ekesto de la renkontiĝo. Kiam li kaj Zdravka veturis tra Vermonto revenante al Montrealo de Novjorko, ili pensis ke estas bele tie, kaj devus esti loko kie esperantistoj el ambaŭ urboj, kaj aliaj, povus veni por semajnfina renkontiĝo. Kiam ili estis hejme, ili rigardis mapon, kaj desegnis sur ĝi liniojn de Montreal al Novjorko, kaj de Bostono al Bufalo. Poste ili reiris por esplori la parton de Vermonto kie tiuj linioj kruciĝis, kaj trovi taŭgan kunvenejon proksime de tie. Okemo Monta Feriejo montriĝis perfekta por tio, kaj Normando kaj Zdravka organizis la unuan renkontiĝon. Marjorie Boulton partoprenis, kaj ŝia ĉeesto helpis allogi okdek aliajn partoprenantojn.

Ĉiujare depost tiam ili denove organizis la eventon. En la jaro kiam Claude Piron partoprenis, cent ĉeestis. Granda laboro, sed tre valora kaj fruktodona laboro, ĉar la kunvenoj plivigligas la esperantistan vivon de la nordorienta parto de la kontinento. Daŭrigante pri la Amikeca Vespero, Amanda Higley gvidis amuzajn ludojn, kiuj ankaŭ donis iom da ekzerco, kaj kaŭzis interŝanĝon de sidlokoj, tiel ke oni renkontis pli da najbaroj.



Dimanĉon je la 9a oni daŭrigis kursojn kiuj komenciĝis sabate posttagmeze, je baza kaj meza niveloj. Por aliaj, je 9:30 atm okazis prelego pri "Kapricaĵoj de Esperanto" de Tom Eccardt. David Coffin parolis pri "Komputila laŭtlegado de E-tekstoj" kaj Paŭlo Hopkins pri la temo "Al familio kaj profesio per Esperanto". Post la tagmanĝo Amanda Higley parolis pri "Unu jaro da vojaĝado tra Eŭropo". (*NdlR*: vidu apartan artikolon pri Amanda Higley en ĉi tiu numero) Kaj tiam okazis oratora konkurso. La temo por la




konkursantoj estis libere elektebla, do estis tre divesaj paroladoj.

Poste okazis "Kultura Vespero" kun multaj partoprenantoj. Sen notoj mi ne memoras ĉies nomojn, do mi nur mencios kelkajn. Estis amuza teatraĵeto de Mira Fleury kaj Aaron Chapman, kaj Thomas Alexander kreis divesajn bestformojn per balonoj. Gonzalo (el Kolumbio) kantis pri Pecos Bill, akompanante sin gitare, kaj alifoje prezentis amuzan du personan skeĉon en kiu li ludis ambaŭ rolojn. La plej juna prezentanto, sesjara Sylvie, kiu venis kun siaj gepatroj John kaj Marie Taylor, el Ontario, deklamis poemon.

Lundan matenon, kursoj daŭris, kaj Alan Boschen parolis pri ESNE, la Esperanto-societo de NovAnglio. Amanda Higley parolis pri siaj klopodoj "revivigadi" la Esperanto-movadon en NordAmeriko, aparte inter studentoj. Vi povas rigardi ŝian retpaĝon por pli da informoj: www.esperanto.org/tejo/la/amanda/. Bill Maxey parolis pri ***Alia perspektivo por Esperanto en lernejoj***, kaj Normando fermis la kunvenon tagmeze. Ĉiuj ekdisiĝis, kaj mi eniris la urbon kun Gonzalo, por tagmanĝi kaj babili, antaŭ ol ankaŭ li devis ekiri. Mi restis ĝis la marda mateno, kiam mi iris hejmen per unutaga dek unu hora veturado. Mi esperas iri denove!

Ken Price



# INTERNACIAJ NOVAĴOJ

## PLI OL 60 MILIONOJ SUBSKRIBIS MANIFESTON 2000

La subskribokampanjo de Unesko por Manifesto 2000 jam pli ol duonvojas. El la celataj 100 milionoj da nomoj pli ol 60 milionoj estis atingitaj en septembro. Duono el ili, iom pli ol 30 milionoj, kolektiĝis en Hinda Unio, dum en Brazilo oni superis 13 milionojn. Efektive, inter ĉiuj neregistaraj organizaĵoj UEA troviĝas sur la 14-a loko en la monda statistiko de kolektantoj de subskriboj por Manifesto 2000. Ĝis la 10-a de oktobro pli ol 60 milionoj da homoj donis per sia subskribo apogon al tiu dokumento, iniciatita de grupo de Nobel-premiitoj pri paco kadre de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco. Duono de la subskriboj kolektiĝis de Monda Spirita Universitato Brahma Kumaris. Pli ol unu milionon atingis ankaŭ Monda Federacio de Unesko-Kluboj, -Centroj kaj -Asocioj.

La 20 plej aktivaj NRO-j laŭ la nombro de kolektitaj subskriboj:

| | |
|---|---|
| 30 588 855 | Monda Spirita Universitato Brahma Kumaris |
| 1 101 481 | Monda Federacio de Unesko-Kluboj, -Centroj kaj -Asocioj |
| 247 365 | Studrondo Guru Gobind Singh |
| 102 168 | Jubillenium |
| 90 014 | Monda Konfederacio de Instruistoj |
| 70 026 | Fondaĵo Dhammakaya |
| 66 816 | Pax Christi Internacia |
| 35 109 | Caritas Internationalis |
| 30 000 | Soka Gakkai Internacia |
| 13 399 | Monda Packonsilio |
| 11 622 | Pacboato |
| 9 578 | Soroptimista Internacio |
| 9 216 | Fondaĵo Alvoko de Nobel-Premiitoj |
| 5 669 | Universala Esperanto-Asocio |
| 4 769 | Kunordiga Komitato de Internacia Volontula Servo |
| 3 243 | Kunularo de Aktivuloj por Homara Bonfarto |
| 2 707 | Monda Organizaĵo por Antaŭlerneja Edukado |
| 2 586 | Monda Skolta Asocio |
| 1 629 | Pacfondaĵo Goi |
| 1 522 | Internacia Konsilio de Organizaĵoj de Folkloraj Festivaloj kaj Popola Arto |

Ankaŭ UEA partoprenas en la kampanjo. UEA eldonis la Esperantan tradukon de la Manifesto kiel belan faldfolion. Multaj Esperanto-gazetoj aperigis la tekston de la Manifesto kun kupono por subskribo. Eblas subskribi ankaŭ en Interreto che www.uea.org/2000.html.

Ĝis la 10-a de oktobro UEA ricevis entute 5669 subskribojn, el kiuj 4152 papere kaj 1517 rete. Inter la 82 landoj Brazilo estas la sola kun pli ol mil subskriboj (1027), sekvata de Italio (853) kaj Francio (633). La statistiko malkaŝas ankaŭ, ke en multaj landoj kun relative forta Esperanto-movado oni ankoraŭ neglektis la kolektadon. Landaj asocioj kaj lokaj kluboj devus rapide ekaktiviĝi, sed iniciatemaj esperantistoj kompreneble ne bezonas atendi ilian instigon por mem ekagi.

Ne temas pri propra kampanjo de UEA sed pri partopreno en la ĝenerala kampanjo de Unesko. Tial esperantistoj kolektu subskribojn ne nur de aliaj esperantistoj sed de ĉiuj homoj en sia medio. Ankaŭ la subskribojn de ne-esperantistoj oni sendu al UEA.



Statistiko de subskriboj pere de UEA je 2000-10-10:

| LANDO | Papere | Rete | Sume |
|---|---|---|---|
| Afganio | - | 1 | 1 |
| Albanio | 14 | - | 14 |
| Alĝerio | 1 | 1 | 2 |
| Antiloj | 1 | - | 1 |
| Argentino | 159 | 7 | 166 |
| Aŭstralio | 19 | 13 | 32 |
| Aŭstrio | 11 | 17 | 28 |
| Belgio | 88 | 66 | 154 |
| Benino | 1 | 13 | 14 |
| Bjelorusio | 1 | - | 1 |
| Bosnio-Hercegovino | 55 | - | 55 |
| Brazilo | 888 | 139 | 1027 |
| Britio | 25 | 41 | 66 |
| Bulgario | 70 | 7 | 77 |
| Ĉeĥio | 331 | 7 | 338 |
| Ĉilio | 86 | - | 86 |
| Ĉinio | 18 | 11 | 29 |
| Danio | 16 | 17 | 33 |
| Ebura Bordo | 1 | - | 1 |
| Estonio | 1 | - | 1 |
| Fiĝio | - | 1 | 1 |
| Finnlando | 28 | 16 | 44 |
| Francio | 181 | 452 | 633 |
| Ganao | 2 | 1 | 3 |
| Germanio | 85 | 67 | 152 |
| Greklando | 2 | - | 2 |
| Hinda Unio | 9 | 4 | 13 |
| Hispanio | 12 | 16 | 28 |
| Hungario | 56 | 12 | 68 |
| Irano | 30 | 27 | 57 |
| Irlando | 1 | 4 | 5 |
| Islando | 1 | 2 | 3 |
| Israelo | 4 | 4 | 8 |
| Italio | 796 | 57 | 853 |
| Japanio | 19 | 21 | 40 |
| Jugoslavio | 87 | 4 | 91 |
| Kamerunio | 1 | - | 1 |
| **Kanado** | **2** | 4 | 6 |
| Kazaĥio | 1 | 1 | 2 |
| Kenjo | 1 | - | 1 |
| Kolombio | 1 | 40 | 41 |
| Kongo, Dem.Resp. | 7 | - | 7 |

| LANDO | Papere | Rete | Sume |
|---|---|---|---|
| Korea Resp. | 1 | 15 | 16 |
| Kroatio | 15 | 2 | 17 |
| Kubo | 9 | - | 9 |
| Latvio | - | 1 | 1 |
| Libano | - | 2 | 2 |
| Libio | 1 | - | 1 |
| Litovio | 5 | 4 | 9 |
| Luksemburgio | 1 | 2 | 3 |
| Madagaskaro | 1 | - | 1 |
| Malto | - | 1 | 1 |
| Meksiko | - | 2 | 2 |
| Moldavio | - | 1 | 1 |
| Nederlando | 88 | 37 | 125 |
| Nepalo | 25 | - | 25 |
| Niĝerio | 4 | - | 4 |
| Nikaragvo | 1 | - | 1 |
| Norvegio | 3 | 17 | 20 |
| Nov-Zelando | - | 4 | 4 |
| Pakistano | 118 | 57 | 175 |
| Pollando | 73 | 9 | 82 |
| Portugalio | 1 | 6 | 7 |
| Rumanio | 11 | 104 | 115 |
| Ruslando | 249 | 46 | 295 |
| San-Marino | - | 1 | 1 |
| Senegalio | 2 | - | 2 |
| Slovakio | 128 | 18 | 146 |
| Sud-Afriko | - | 4 | 4 |
| Svedio | 17 | 19 | 36 |
| Svislando | 63 | 9 | 72 |
| Taghikio | 1 | - | 1 |
| Tajlando | 1 | 1 | 2 |
| Tanzanio | 18 | 1 | 19 |
| Togolando | 41 | 3 | 44 |
| Turkio | 1 | - | 1 |
| Ukrainio | 105 | 18 | 123 |
| Usono | 9 | 45 | 54 |
| Uzbekio | 3 | - | 3 |
| Venezuelo | - | 2 | 2 |
| Vjetnamio | 44 | 12 | 56 |
| Zambio | 1 | - | 1 |
| (Nekonata) | - | 1 | 1 |
| TOTALE | 4152 | 1517 | 5669 |

***NdlR*: evidente ni en Kanado ne multe atentis pri la kolektado de subskriboj. Mi tuj agnosku ke ankaŭ mi ankoraŭ ne subskribis. Sed ne estas tro malfrue - kaj ni celu multoblan pligrandiĝon de nia ĝisnuna totalo!**

## RETA DISSENDO-LISTO DE LA AKADEMIO

La estraro de la Akademio de Esperanto decidis starigi novan dissendan liston, cele al konatigo de la temoj diskutataj ene de la akademio, ĉar ofte la diskutoj ene de la Akademio de Esperanto havas intereson ankaŭ por aliaj personoj ol ĝiaj membroj. Tial la estraro decidis starigi dissendan liston cele al konatigo de la akademiaj temoj. La nova listo dissendos la mesaĝojn kiujn la membroj mem volas diskonigi ekster sia rondo. Ĉiu povos aliĝi al ĝi kaj kontribui al la interŝanĝo de ideoj. La adreso de la nova dissenda listo estas: <akademia-diskuto@egroups.com>. Se vi volas aliĝi al la listo 'Akademia Diskuto' kaj poste ricevi la mesaĝojn de tiu listo, sendu malplenan mesaĝon al la adreso <akademia-diskuto-subscribe@egroups.com>. Mi tre esperas ke tiu servo utilos al nia lingvo.

Christer Kiselman (el *ret-info*)

## LA PLEJ GRANDA ESPERANTO-KATALOGO EN LA INTERRETO

Internacia Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu posedas la plej grandan planlingvan bibliotekon, realigas ekde 1996 unikan projekton: la kreon de la elektronika katalogo TROVANTO, konsultebla en interreto.

En la nuna momento troviĝas jam pli ol 9400 rikordoj (dokumentoj) en ĝi, kaj tiu nombro kreskas ĉiu-monate. Jam nun ĝi estas la plej granda katalogo pri Esperanto kaj interlingvistiko. Inter la dokumentoj troviĝas libroj, broŝuroj, manuskriptoj, aŭd- kaj vidkasedoj, kompaktdiskoj, k.s. (sed ne revuoj). La Aŭstria Nacia Biblioteko financas la kreon de TROVANTO. La daŭrigo de la laboro tamen povas okazi nur se la esperantistoj ĝin vere bezonas, aŭ, por alimaniere diri, se sufiĉe da homoj utiligas TROVANTO-n en la interreto. Tial ni invitas vin regule viziti ĝin. Ĝia adreso:

<http://www.onb.ac.at/online_s/onspdbfr.htm>

Alia eblo aliri estas tra la hejmpaĝo de la Aŭstria Nacia Biblioteko:

<http://www.onb.ac.at/sammlgn/safr.htm>

(el *ret-info*)

## PLEDO POR PLUELDONO DE PRESITA *EL POPOLA ĈINIO*

En la oktobra numero de la konata revuo ***El popola Ĉinio*** estas anonco pri la ĉesigo de ĝia eldonado en la ĝisnuna papera formo. Estonte la revuo aperos nur en la elektronika reto, kie ĝi estos senpage rigardebla. Ĉar dum 50 jaroj ***EPĈ*** fariĝis tre konata kaj ŝatata inter esperantistoj, mi petas ĉiujn abonantojn kaj ŝatantojn de tiu revuo, ke ili bonvolu skribi al la ĉina ambasadejo en sia lando por esprimi sian bedaŭron kaj sian deziron plu ricevi la revuon ankaŭ en la nuna formo.

La letero estu pozitive vortumita, tio estas: ĝi emfazu la altan kvaliton de la revuo, ĝian utilecon por ekkoni Ĉinujon kaj ĉinajn problemojn kaj la ĝeneralan ŝaton de ĝi fare de la legantoj, ktp. Fine de la letero oni esprimu la deziron, ke la kompetenta registara instanco repripensu la decidon kaj ebligu pluan aperon de la papera versio de ***El popola Ĉinio***.



Mi ankaŭ instigas ĉiujn, kiuj havas tiun eblecon, regule mem legi kaj diskonigi al aliaj la retan version de ***EPĈ*** ĉe <www.ĉina.org.cn> por montri ankaŭ tiel la popularecon de la revuo inter esperantistoj. Dankon pro via kunlaboro!

Renato Corsetti (Vicprezidanto de UEA)

## DANKADO AL ZAMENHOF

Kiuj uzas la internacian lingvon, ĉu ĉiuj scias, ke per tiu gesto ili dankas al ZAMENHOF? Eble suba rakonto povas aludi pri io tia.

Kiam Zubede havis 16 jarojn, li forlasis sian naskiĝvilaĝon. Pasiginte pli ol kvindek jarojn ekster sia lando, li revenis iom maljuna, sed kun iom da monrimedoj. Li havas nek edzinon kaj gefilojn. Infanojn li tre ŝatas, kaj ĉiuvespere akceptas ilin en sia domo. Li proponas manĝojn diversajn al la infanoj, organizas helpinstruadon por komprenigi lernejajn lecionojn al ili. Tempo pasas, kaj la ago de Zubede jam fruktoportas: infanoj plenkreskas. La tuta vilaĝo rekonas liajn bonfarojn, sed Zubede mem ĉiam havas zorgojn: "post mi, kio okazos? Kiuj daŭrigos mian agadon." Li provis konvinki la vilaĝestron, ke tiu ĉi trovu solvon al tiu problemo. Konsciante pri la laboro de Zubede, la vilaĝestro helpis, ke aliaj homoj eklaboris kun Zubede. Kiam iu diras al li dankon, li respondas: 'mi bezonas dankon, se ne la vorton mem, sed la agon. Tian ĉi faris la vilaĝestro, dank'al kiu mi certas, ke post mi mia agado pluiros.' Mortis Zubede, sed nun lia domo estas pli ol lernejo, kie oni prizorgas infanojn.

Jes, jen tiel ni, Esperantistoj estas dankemaj al Zamenhof, ĉar ni daŭrigas lian agadon. Tiu dankesprimo estas ne samgrada en niaj koroj. Iuj estas ekstreme dankemaj: ni povas citi homojn, kiuj donacas monegon kaj sin mem por ke Esperanto disvastiĝu tra la tuta mondo. En la revuo *Esperanto* aperas nomoj de donacantoj. Vere ankaŭ tiuj homoj meritas la dankemon de aliaj Esperantistoj. Kiuj ne povas mem doni monon, iuj el tiuj sin dediĉas al la Esperanto-laboro. Ĉar Esperanto ne egale estas praktikata sur la kvin kontinentoj de la terglobo, aparta klopodaro necesas por verdigi kontinenton jam nigran.

Ekde 1980 pluraj ekster-Afrikanoj kaj Afrikanoj komune laboregas. Nun, dudek jarojn poste, multas Esperantistoj en Afriko. Tiuj ĉi kapablas instrui la lingvon, gvidi la movadon en siaj landoj. Afrika Oficejo servas la afrikajn Esperantistojn. Sed la financa flanko neniel ŝanĝiĝis: preskaŭ ĉiuj Esperantistoj Afrikaj plu estas nepagipovuloj. La plu-ekzistado de la Afrika Agado dependas preskaŭ plene de la fidelaj donacantoj al la Fondaĵo Afriko. Iam fluegis la donacoj kiel akvofalo. Lastatempe la torento fariĝas rivereto. Sekeco minacas ne nur la Afrikan kamparon, sed ankaŭ la Afrikan fondaĵon.

En la Kongreso de Telavivo la Komitato de UEA konatiĝis kun plano, nomita PRIORITATO AFRIKO, kies kvina paragrafo konsilas starigi grandan kapitalon kies rento financu la movadon en Afriko. Tuj post la UK, la respondeculoj pri la Afrika Agado sendis leterojn al ĉiuj partoprenintoj kiuj montris sian interesiĝon. Ili fariĝas nun Esperantistoj Amikoj de Afrikaj Esperantistoj (EAAE). Iliaj respondoj jam alvenas. La unua venis de s-ro Etsuo MYOSHI kiu donacis 50 000 enojn japanajn por la kapitalo. Sendube multaj kiuj havas la rimedojn por tio, volos sekvi lian ekzemplon. Ili fariĝu EAAE kontribuante al la netuŝebla, neelspezebla parto de la Fondaĵo Afriko. Tiu parto nomiĝas: *La Nedisponebla Kapitalo de la Fondaĵo Afriko.* Kontribuante tiel, ili kontribuas al la daŭrigado de la Afrika Agado kaj al ĝia financa memstariĝo.

GBEGLO Koffi (estrarano de UEA)

## ARTIKOLOJ

### Kandidataj spertoj (oktobro 2000)

Kiam mi decidis kandidatiĝi en la lasta ĝenerala baloto, du opinioj konkursis inter miaj amikoj kaj proksimuloj. La unua: “Kian kuraĝan aferon vi faras!” La dua: “Vi frenezas!” Mi pli-malpli konsentas kun ambaŭ!

Kiam la ĉefministro Chrétien estis baldaŭ komenconta la konkurson en oktobro 2000, mi vokis la lokan oficejon de la Nov-Demokrata Partio kaj demandis al ili kiu estas la kandidato en mia distrikto. Mi ĉiam apogis la NDPon ekde mia frua junaĝo kiam mi ekaŭskultis la novaĵojn. (Mi tre frue komencis sekvi aktualaĵojn ĉar mia patro estas raportisto por Radio Kanada, kaj la radio ĉiam ludis en nia domo.) Mi firme subtenis iliajn starpunktojn pri la resaniĝo de niaj sanasekura, edukada, kaj socia subtena sistemoj, homaj rajtoj, kaj ekologia purigo.

Tamen, kiam mi vokis al la NDPa oficejo, la juna virino kiu respondis, Piper Huggins, sciigis al mi ke ankoraŭ ne estis NDPa kandidato en mia distrikto, Verdun/St-Henri/St-Paul/Pte-St-Charles en la sudokcidenta parto de Montreal-Insulo. Ni parolis iom plu – mi estis ĵus petinta mian aliĝon al la partio – kaj ŝi allogigis al mi la ideon ke eble mi prezentu min kiel kandidato. Poste, mi iris al la NDPa oficejo en Sankt-Josefo strato, kaj mi renkontis ŝin; ŝi donis al mi multajn dokumentojn kun konsiloj pri politika konkurso. Mi tralegis ilin. Konsiderante ke mi estis uzanta la trimestron kiel ferion for de universitato, kaj ke mi ofte konsideris fari politikan kampanjon, la ideo kreskis en mia menso ĝis mi konsentis prezenti min.

Estis alia ebleco pri kandidato ĉi-distrikte – loke fama dramverkisto kaj NDPano – sed li devis malakcepti pro konflikto kun alia grupo en kiu li anis, la Internaciaj Socialistoj. Se li akceptintus, mi akceptintus kandidatiĝi en alia distrikto, sed nun mi rajtis kandidatiĝi en mia propra distrikto, sen kandidatiga renkontiĝo por elekti kandidaton per voĉdono.

Sekve mi iris al la raporta oficejo de Elektado Kanada por ricevi mian akton de kandidatiĝo. Tiu estas dika griza libreto kun lokoj por ĉia informo pri la kandidato, kaj ankaŭ loko por subskriboj. Por akceptiĝi kiel kandidato, oni devas rikolti cent subskribojn de homoj kiuj loĝas en la distrikto kaj rajtas voĉdoni. Grandaj partioj havas neniun problemon pri tio, sed mi devis iri pord-al-porde en mia najbarejo por rikolti la subskribojn. Post semajno mi havis sufiĉe da, kaj la partio donis al mi konfirman leteron por mi kaj mia oficiala agento (mia amiko kaj samdomano James), kaj ankaŭ ĉekon por la bezonata kandidatiga pago de $1000. Mi liveris ĉi ĉion al la raporta oficejo, kaj post kelka tempo ili sciigis min ke mian kandidatecon oni konfirmis. Mia nomo skribiĝos sur la balota papero!

Mi tuj forsendis komunikaĵojn al la urba gazetaro. Mi ricevis plurajn respondojn. Mi intervjuiĝis dufoje en la semajna revuo *Hour*, kaj dufoje por Radio-Kanada televido. Multaj revuoj interesiĝis pri mi pro mia juneco. Pro tio ankaŭ, mi invitiĝis partopreni en debatoj ĉe pluraj kolegioj en la montreala areo.

Mi aĉetis 48 grandajn plastajn ŝildojn kaj ene de tri tagoj mia patro kaj mi distribuis ilin iom ĉie en la distrikto. Verŝajne ili rikoltis por mi la plejparton de miaj voĉoj. Ofte homoj diras, 'mi volis voĉdoni por iu partio sed mi neniam vidis iliajn ŝildojn'. Do mi distribuis la ŝildojn laŭ trafikpopularaj areoj: laŭ grandaj avenuoj kaj ŝoseoj, antaŭ metrostacioj, kaj speciale apud malsanulejoj. Kompreneble, tamen, mi ne havis la rimedojn de la liberala, blokista [*NdlR, t.e. kandidato por la 'Bloc Québécois', partio kiu favoras sendependecon por Kebekio*], kaj aliancista [*NdlR: dekstra partio*] kandidatoj, kiuj kovris la tutan distrikton de limo ĝis limo per multegaj ŝildoj.



Kvankam mi metis la ŝildojn ĉie, pro la longa tempo bezonata mi distribuis faldfoliojn plejparte en Pointe St-Charles, la plej malriĉa distrikto. Tio postulis longegajn horojn de pordalporda marŝado en tre malvarma vetero. Mi kalkulis ke mi disdonis preskaŭ 3200 propramane.

Verŝajne la pinto de la kampanjo okazis kiam komuna grupo gastigis ĉiukandidatan debaton en la sendomula logejo St Columba House. Ĉiuj kandidatoj venis – krom la liberala kandidato! Multaj homoj ofendegiĝis pro tio ke li eĉ ne volis veni por renkonti la popolon de la distrikto. Inverse, mi kredis ke miaj respondoj tre plaĉis al la ĉeestantoj, kiuj starigis tre gravajn demandojn pri multaj sociaj temoj, kiel la ekologio, sociaj loĝejoj, kaj la rolo de virinoj en politiko.

Unu afero kiu ege plaĉis al mi estis tio, ke mi kaj la kandidato por la Verda Partio agnoskis ke ni laboris samcele, kaj ni interŝanĝis informojn kaj faktojn pri la kampanjo. La farendaj taskoj de socia demokratio estas pli gravaj ol dividlinioj inter partioj!




Kaj fine, kiam ĉio estis finita, venis la granda tago, lundo la 27a de novembro. Frue en la mateno mi iris kun mia samdomano al la balotejo. Mi diras ke estis granda sperto vidi mian propran nomon en la balotilo, kaj voĉdoni por la unua fojo – por mi mem!

Kiam la batalo finiĝis kaj la voĉoj kalkulitaj, mi fine ricevis 1075 vocojn, 2,6% de la sumo. Kvankam la liberaloj gajnis, mi ricevis pli grandan kvanton de la voĉoj ol la Nov-demokratoj ricevis en la distrikto depost 1988. Kaj kvankam la NDP perdis 6 deputitojn en parlamento, almenaŭ ni retenis nian staton de oficiala partio. Ĉiuj rezultoj havas bonan kaj malbonan flankon.

Tiu kampanjo estis lacigega kaj bezonis semajnojn da konstanta strebo kaj elspezo de fortoj. Kaj mi hastas fari ĝin denove! Mi kredas ke multaj homoj voĉdonos por mi se ili povas vere aŭdi mian mesaĝon, kaj kun miaj spertoj ĉifoje, mi povos fari eĉ pli bonan kaj efikan kampanjon venontfoje.

Ĉiu voĉo estas grava!

Matt McLauchlin

NEKROLOGOJ

*Pastro D-ro Paul Vaughan*, 1936-2000

Paul Vaughan interesiĝis pri Esperanto, kaj fariĝis dumviva membro de KEA en la fruaj sesdekaj jaroj, kiam li estis asekura agento ĉe Standard Life.

Li fariĝis persona amiko mia, kaj kiam li malfermis propran oficejon kaj fariĝis makleristo por ĉiaspeca asekuro, li fariĝis mia asekura agento. Mi ofte vizitis lian oficejon por trinki kafon kaj babili pri ĉio ajn, kaj kvankam Paul neniam plene lernis Esperanton, mi sukcesis instrui al li, kaj al liaj tri filoj, almenaŭ kelkajn vortojn. Paul estis skoltestro, kaj instruisto pri sekureco por la 'Ambulanca Organizaĵo de Sankta Johano'. Li foje neatendite paroligis min pri Esperanto ĉe sia matena kunveno de agentoj, ĉe sia marskolta trupo, kaj aliloke. Ĉar mi ne ŝatas prelegi (nur babiladi dum kaftrinkaj kunvenoj!!), mi fariĝis iom singarda pri lia emo tiel embuski min.

Li mem estis bona preleganto, kaj iam en la sesdekaj jaroj estis la oratora ĉampiono de Ontario. Majstra rakontisto, liaj anekdotoj pri okazaĵoj en lia propra vivo povis teni la atenton de liaj amikoj dum horoj.

Paul kaj lia edzino Margaret studis en la Ontaria Biblia Kolegio, kaj poste en misiista kolegio, kaj fariĝis kristanaj misiistoj. Kiam li finis la studadon, oni sendis lin al Afriko, kie li laboris en Kenjo dum kelkaj jaroj. Ekzistas tre interesa rakonto lia pri 'Unu Tago en la Vivo de du Orient-Afrikaj Pioniraj Transkulturaj Misiistoj', kiu estas havebla en Esperanto (kaj en la angla). Mi ankoraŭ havas du aŭ tri ekzemplerojn en Esperanto, kiujn mi sendos al la unuaj petantoj. Mi ankaŭ povas disponigi la tekston de la Esperanto-versio kiel (longan) retmesaĝon.

Reveninte al Kanado, kaj li kaj lia edzino suferis pro malsanoj. Lia edzino Margaret mortis frue ĉi-jare; Paul forpasis en oktobro. Al liaj tri filoj, Steven, Bryan, kaj Grayden, mi sincere kondolencas.

Ken Price

*Rüdiger Eichholz*, 1922-2000

Rudi naskiĝis en Stralsund, Germanio, la 17an de majo 1922. Li estis la plej juna el kvar infanoj, kaj la sola knabo. Nur unu el liaj fratinoj, la plej aĝa, postvivas lin. En 1953 li enmigris Kanadon, kun sia edzino Vilma, kaj ili ekloĝis en Toronto, en la domo de esperantistino, S-ino Nii. Edukita kiel fizikisto, Rudi ne volis fari laboron kiu povus kontribui al militkapablo, do li fariĝis riparisto de televidaj aparatoj.

En 1956 Rudi kaj Vilma aĉetis domon en la kamparo apud Oakville, 30 km okcidente de Toronto, kaj transloĝiĝis tien. Rudi kolektis sonbendajn registrojn de paroladoj faritaj en Universalaj kongresoj, kaj aliloke, de famaj esperantistoj, kaj de radio-elsendoj en Esperanto. En 1957 li fondis la Magnetofonan Servon de U.E.A.. Kontraŭ malgranda pago oni povis mendi kopion de eroj en lia katalogo.



Rudi kaj Vilma havis tri infanojn. Unu estis filo nomita Alko, kaj du filinoj, Suna kaj Brila. Suna kaj Brila pluvivas. Ĉiuj lernis Esperanton nature "denaske" de la gepatroj. Por vizitantaj esperantistoj estis ĉarme babili en Esperanto kun la junaj infanoj.

En 1959, je la 18a de julio, ili malfermis sian domon kiel kulturan centron por Esperantistoj. Inter pli ol dudek personoj kiuj ĉeestis la malfermon de la Esperanto-Domo estis tri ĵurnalistoj. En julio 1960, la dua kongreso de Kanada Esperanto-Asocio (refondita en 1958) okazis en ilia Esperanto-domo, kaj kelkaj el la ĉeestantoj loĝis tie dum la kongreso.

En la sekvaj jaroj Vilma instruis Esperanto-kursojn tie, kaj ili fondis lokan klubon. Rudi aĉetis presmaŝinon, kaj fariĝis eldonisto kaj presisto. Li nomis sian entreprenon 'Esperanto Press'. Li eldonis librojn en kaj pri Esperanto. Kelkaj el ili estis verkitaj de Vilma. Ĉar ne eblis sendi monon al Kanado el kelkaj el la landoj kie li vendis librojn, li akceptis aliajn Esperanto-librojn interŝanĝe. Do li ankaŭ fariĝis vendisto de Esperanto-libroj en Kanado. El tio kreskis la 'Libroservo de KEA', kiam li, pro troa okupiteco, vendis la librostokon al KEA en 1961.

Unu el la kialoj de tiu okupiteco estis ke li fariĝis redaktoro de la Kanada Esperanto-Revuo en 1961. Same kiel multaj redaktoroj de tiaj gazetoj, li ekscii ke kvankam li 'devas' produkti gazeton je certa tempo - mankas kontribuoj de la membroj. Do, la redaktoro mem verkas la artikolojn, aŭ prenas ilin el aliaj gazetoj. Kompreneble, kelkaj membroj (kiuj ne mem sufiĉe kontribuas) emas plendi ke la gazeto enhavas tro da artikoloj/novaĵoj de aŭ pri la redaktoro kaj lia familio. Notinde estas, ke li kaj Vilma tiutempe ja estis treege aktivaj ankaŭ en propagandado, kaj certe estis ĉiam publikigendaj novaĵoj pri ilia agado.

En 1976 Rüdiger Eichholz elektiĝis membro de la Akademio de Esperanto, kaj poste fariĝis direktoro de la sekcio 'Teknikaj Vortaroj'. Unu granda atingo de lia vortara laboro estis la aperigo de Esperanta versio de la konata bildvortaro *Duden*. Li sukcesis havigi permeson de la firmao, kaj faris la grandegan laboron traduki, kompili, kaj presi ĝin.

En 1980, vendinte la domon en Oakville, ili transloĝiĝis al Baillieboro, kie ili konstruis domon sur bieno apud la norda bordo de lago Rice (Rizo). La presmaŝino instaliĝis tie, kaj Rudi daŭrigis la laboron de Esperanto Press. Li presis lernolibrojn verkitajn de Vilma, anglalingvan *Life of Zamenhof* de Privat, kaj multajn aliajn librojn. Li ankaŭ presis la gazeton de KEA, kiu nun nomiĝis *Lumo*.

Dum multaj jaroj Rüdiger Eichholz kolektis difinojn de Esperantaj vortoj, kun tradukoj en kelkaj lingvoj. Unue ili estis sur pecoj de papero, la 'slipara vortaro'. Post la populariĝo de personaj komputiloj (Rudi preferis diri “komputoroj”) ĉion oni retajpis komputile. La interreto multe plirapidigis la interŝanĝon de opinioj inter Rudi kaj la kunlaborantoj en la Akademio. Alia grandega laboro estis la kompilado kaj presado de la 600-paĝa libro *Esperanto in the Modern World* (*Esperanto en la Moderna Mondo*), kiun li kaj Vilma faris.

La sorto forte batis lin en 1994, kiam li venis hejmen post vizito al Germanio. Vilma, kiu restis ĉehejme dum Rudi estis en Eŭropo, estis treege laca. Kuracisto diagnozis hepatkanceron. Post kelkmonata batalo la kancero venkis, kaj Rudi perdis sian edzinon kaj kunlaborantinon. Li volis trovi junan paron esperantistan, eble en Eŭropo, kiuj volus veni kaj loĝi ĉe li en Baillieboro, kaj transpreni la laboron de Esperanto Press. Li reklamis en revuo Esperanto, kaj serĉis alimaniere, sed sensukcese.

Fine, li devis rezigni pri la ebleco iamaniere daŭrigi la eldonlaboron. En majo 2000 li vendis sian domon, kaj translogiĝis al apartamentejo por emerituloj en Cobourg. Ĉar li devis forigi ĉion el la domo, li donacis la restantan stokon de libroj al KEA, kiu ricevis proksimume du mil ekzemplerojn de *Esperanto in the Modern World* senpage.

Rudi diris ke Suna kaj Brila multege helpis al li pretigi la domon en Baillieboro por transdoni al la nova posedanto, kvankam ili devis ĉiam veturi de Toronto por fari tion. Li ĝojis ke 'ili ambaŭ trovis bonajn edzojn'. Bedaŭrinde li ne havis multan tempon por ripozi kaj ĝui sian emeritecon. Je la 26a de aŭgusto Rudi havis apopleksion. Li mortis en malsanulejo dek tagojn poste, je la 5a de aŭgusto 2000, sendolore, dum Suna kaj Brila estis kun li.

Niajn sincerajn kondolencojn al Suna kaj Brila.

Ken Price

Revuoj ricevitaj de la redakcio de *Lumo*: la *Torontano* 57-8, *Svisa Esperanto-Societo informas* (2000/4), *La Tradukisto* (el Islando), 34-5, *Verda Lumo* 17.10, *Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio* 275-6 (2000). Al ĉiuj dankon. La redaktoro aparte bonvenigas ekzemplerojn de lokaj kanadaj E-revuoj.

## FINA NOTO DE LA REDAKTORO

Eldonkvanto de ĉi tiu numero: 320

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi al ni siajn taksojn, opiniojn,sugestojn kaj kritikojn, kio ebligos plibonigon de la revuo. *Lumo*-n senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiu KEA havas interkonsenton pri interŝanĝado de revuoj.

**NE FORGESU REALIĜI AL KEA POR 2001**




**Monato**

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**22a Jarkolekto 2001**

**Informiĝu pri okazantaĵoj en la nova 3a jarmilo pere de la internacia revuo MONATO. Ĝi raportas el ĉiuj anguloj de la mondo, tra la okuloj de lokaj loĝantoj kaj informos vin pri aspektoj kaj eroj kiujn naciaj kaj internaciaj revuoj en la mondo preteratentas. En la tuta Esperantujo ĝi estas unikaĵo, la nura revuo kiu plenumas la celon de Esperanto ĝisfunde: informi ne pri, sed per Esperanto.**

Mendu la revuon ĉe la eldonanto
Flanda Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
BELGIO

**kan$ 67,00** (aere + kan$ 9,00)


**Jen nia solvo de la printempa/somera Akrostiko:**

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| B | A | R | B | A | R | A |
| E | | R | M | | E | N |
| R | E | Z | U | | L | T |
| V | A | M | P | I | R | O |
| E | N | G | R | A | Ŭ | L |
| L | E | O | P | A | R | D | O |
| I | | M | | A | | G |
| N | E | G | L | E | K | T | I |
| G | A | L | I | M | A | T | I | O |

La du vortoj estas BERVELING kaj ANTOLOGIO. Gerrit Berveling estas la tradukinto de lastatempe eldonita du-voluma antologio (la tria sekvos) de latina literaturo.

Refoje, multan dankon al Marjorie Boulton.

## DIVERSAĴOJ

*Kelkaj ekzercoj pri prononcado (aŭ 'Langnodaj frazoj')*

(1) Sciencistoj scias, ke sciuro ne estas specio, kiu svingas sceptron.

(2) Konstanteno konstatis kun kreskanta konsterno, ke konstriktoro strikte stringas Kolombinon, lian konkubinon!

(3) Pego pagis paganan pigon per peklaĵoj kaj pektenoj, kiuj plaĉas al pigoj sur pagodoj.

(4) 'Mi aŭ miaŭos aŭ mi aŭdos miaŭadon', miaŭis Maja la kato en mia aŭto.

(5) La ĉeĥa ĉefpastro ne ĉesis ĉasi la ĉastan ŝvaban ŝoforinon ĝis ŝi ŝvenis.

(6) Dum vesproj nepre preĝu pie, ne vespece spitu, kaj ne profanu per spontaneaj spritaĵoj.

(7) Ĉit! Ĉu ĉifĉafoj ĉiam ĉantas ĉirkaŭ ĉiuj ĉaletoj en Ĉilio?

— Marjorie Boulton


LA AVENTUROJ DE SUPERZAM MODERNA HEROO
LA URBO NENOPOLO ESTAS MINACATA DE TERURA MONSTRO...
GRRRK!!
NRRGK!
KRRG!!
KONTRAŬ ĜIA NEKOMPRENEBLA BUŜMITRALADO, TUTE MALEFIKAS ĈIUJ ARMILOJ...
PAF!
HO VE!
¡U HELPU NIN!
HO, KIU SAVOS NIN?
PLUM!
LA URBANOJ PERDAS SIAJN ESPEROJN — SED EN LA AMASO ESTAS DU ĴURNALISTOJ, KIUJ, PER SPECIALA RINGO, SENDAS URĜAN MESAĜON, KIU TUJ RAPIDAS ĜIS LA PLEJ FORAJ ANGULOJ DE PROKSIMA UNIVERSITATO - AL LA SUPERORELOJ DE LA TIMEMA DOKTORO LAPLUMO—
HELPON!
JEN NOVA TASKO POR...
SUPERZAM!
KUN MIRINDA RAPIDO LA ŜTALA VIRETO FLUGAS TUJ AL LA DANĜERA LOKO...
HURA!
LA FELIĈAJ NENOPOLANOJ TUJ FARAS MULTAJN DEMANDOJN AL SIA NOVA HEROO —
KIEL VI FARIS TION SUPERZAM?
MI RICEVIS LA MESAĜON PER MIA AŬDA FORTO, VENIS PER FLUGA FORTO KAJ DETRUIS LA MONSTRON PER NURA SUPERFORTO.
KAJ ĈU VI POVAS UZI VIAJN FORTOJN ĈIE AJN?
HO CERTE — TIO ESTAS MIA UNIVERSALA FORTARO!
KAJ DE KIE VENAS VIA FORTARO?
MIAJN FORTOJN MI KREIS MEM — KOMENCE ESTIS NUR CERTA INTERNA IDEO....
SEKVU LA AVENTUROJN DE NIA HEROO EN ĈIU NUMERO DE "KIAL NE?"
JANO